

Pledas Cabello por la revolucia unueco venkocele en la parlamentaj elektoj



Karakaso,
sep 14
(RHK) La
unua

vicprezidanto de la socialista partio unueca de Venezuelo (PSUV), Diosdado Cabello, certigis ke la unueco de la revoluciaj fortoj estas hodiaŭ la sola garantio por venki en la parlamentaj elektoj la venontan 6-an de decembro.

Pere de sia socia retejo en Twitter, la partia gvidanto alvokis ĉiujn patriotojn altiĝi la flagojn de digneco kaj sendependeco.

Cabello aĝuris la malvenkon elektan de tiuj, kiuj klopodas krei dividojn en la revoluciaj fortoj, kiel politika strategio por havi ĉancojn en la venontaj elektoj.

Siaflanke, la opozicia gvidanto Claudio Fermín, esprimis ke tiuj, kiuj pledas por punoj kaj la ekonomia blokado neglektas la nacian suverenecon.

Dum intervjuo kun la ĵurnalistoj kaj ministro de kulturo, Ernesto Villegas, la reprezentanto de la partio Solvoj por Venezuelo, esprimis ke decidi la sorton de la lando ekster la naciaj landlimoj kaj pledi por ke eksterlandaj tribunaloj juĝu la venezuelanojn, estas neglekto pri memestimo.

Fermín emfazis ke la procezo de internacia konspiro estas unu el la plej malfacilaj vojaĵoj travivataj de tiu ĉi sudamerika lando.

Spite al la malstabiligaj klopodoj kaj la alvoko de la ekstrema dekstrularo bojkoti la procezon, pli ol cento da partioj kaj organizoj de ĉiuj politikaj tendencoj, kandidatigis antaŭ la nacia elekta konsilantaro 14 mil kandidatojn al la Nacia Asembleo, en malobeo ekde 2016 pro malrekono kaj defio al la ceteraj povoj de la ŝtato.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/234064-pledas-cabello-por-la-revolucia-unueco-venkocele-en-la-parlamentaj-elektoj>



Radio Habana Cuba